

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschijnt maandelijks  
Twintigste jaargang  
Nummer 9 (230)  
SEPT. 1953

Vertegenwoordiger in Nederland:  
L E E N  
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone  
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de  
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND  
POSTBUS 100, MECHELEN  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.  
Raapstr. 74, Gent

LIDGELDEN:  
\* Leden: 100 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:  
België: 75 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## NIA 38-a EN ZAGREB

La ĉi-jara U.K. en Zagreb restos longe en la memoro de ĉiuj, kiuj havis la okazon viziti ĝin. Ne nur pro la konata sfero, kiu regas en ĉiuj internaciaj esperantistaj aranĝoj, ne nur pro la bonege sukcesintaj kunsidoj kaj festespejoj, sed pro la maniero laŭ kiu niaj geamikoj en Zagreb sciis eluzi tiun unikan okazon. Granda parto el la kongresanoj alvenis jam vendrednokte kaj tuj ili estis kaptataj pro la girlandoj de esperanto-flagetoj, kiuj gaje ornamis la stacidomon. En la tuta urbo oni trovis flirtantajn flagojn, en la montfenestroj la esperanto-flagetoj estis disse semitaj. Oni ornamis la tramveturilojn. La loka tagjurnalo „Narodni list“ aperigis ĉiutage specialan kolonon en Esperanto. Multaj aliaj landaj gazetoj detale raportis pri la plej grava internacia kongreso, unufoje okazanta sur la Balkano. La tuta urbo Zagreb estis dum unu semajno en la signo de „Esperanto“. Sed krome estas menciinde ke la jugoslaviaj kaj zagrebaj aŭtoritatoj grave subtenis la aranĝon, bone kaj efike. La partoprenintoj guis 50% rabaton ĉe la fervojoj. La poŝta direkto eldonis 2 apartajn poŝtmarkojn, la filatelista asocio aperigis unuataĝan koverton kaj esperantan poŝtkarton. Pro ĉiuj ĉi-tiuj subtenoj la kongreso vekis gravan atenton, ne nur en Zagreb, sed ankaŭ en la lando, tiel ke la magia vorto „Esperanto“ malfermis ĉiujn pordojn.

La solenan inaŭguron en la koncert-halo de la Foirejo, kie amasigis 1760 esperantistoj el 30 landoj, ĉeestis la honora protektanto de la kongreso s-ro d-ro Vladimir Bakarić, la urbestro de Zagreb s-ro Večeslav Holjevac kaj krome s-ro Pierre Lebar, reprezentanto de UNESCO. En la scenejo denove pendis la giganta kongresa flago meze de naciaj flagoj. Post eksono de la nacia himno kaj de la uverturo „Egmont“ de Beethoven, fare de bona orkestro, la urbestro de Zagreb salutis la kongreson esperantlingve. Li skizis la signifon de la U.K. por la urbo kaj menciis, ke honore al ĝi kaj al la aŭtoro de Esperanto la urbestro decidis doni la nomon Zamenhof al unu strato. La prezidanto de UEA s-ro Enfrid Malmgren, laŭ sia kutima maniero malfermis la kongreson, salutante samtempe la venintajn eminentulojn. Speciale li akcentis la ĉeeston de s-ro Lebar, observanto de UNESCO, kaj esprimis la esperon, ke tiu reprezentanto trovos la tempon por bone ekkoni nian movadon.

En flua esperanto nun alparolis la ĉeestintaron la honora protektanto de la kongreso kaj prezidanto de la Kroatia Registaro, s-ro Vladimir Bakarić. Li bonvenigis la kongreson en la nomo de la jugoslavia kaj kroatia registaroj. „Jugoslaviaj oficialaj instancoj jam dum pluraj jaroj kun granda intereso sekvas la laboron de la esperantistoj. Ilia laboro por pli facilaj interkomprenigo kaj kunlaboro inter diversaj nacioj prezentas rimarkindan kontribuon al la ĝenerala strebado de ĉiuj popoloj por efektiviĝi pacon kaj amikan kunlaboron en la mondo. La egalrajteco kaj rajto de sendependeco de ĉiuj popoloj estas unu el la fundamentaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝuste vi esperantistoj havas en la internacia lingvo rimedon, kiu povas multe helpi por la realigo de tiuj ĉi principoj. La ĝisnunaj atingoj de la esperanto-movado, via relative riĉa literaturo, via multnombra gazetaro, viaj kongresoj kaj internaciaj renkontoj estas pruvoj de viaj organizaĵoj kaj pri la grandaj eblecoj, kiujn donas la internacia lingvo Esperanto“ lia mosto i.a. diris. Kaj finante per „Certe, la sociopolitikaj konceptoj de niaj homoj ofte diferencas de la viaj, sed en la komuna batalo por unu pli bona mondo, ni ĉiam devas serĉi kaj trovi proksimigajn vojojn kaj eviti ĉion, kio povas malhelpi tiom bezonan kaj efektive eblan kunlaboron inter la diversaj popoloj“ li deziris brilan kongreson. Sekvis la vicon s-ro d-ro Ivo Borovečki, prezidanto de LKK, kiu elokvente salutis ĉiujn ĉeestantojn. „Ni jugoslaviaj esperantistoj estas aparte ĝojaj ke ni povas bonvenigi tiom da eksterlandaj gastoj. Ni estas certaj ke jugoslaviaj esperantistoj kune kun siaj eksterlandaj



## 39a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - HAARLEM NEDERLANDO

Adreso: Poŝtfolio 140, Haarlem

**Korekto:** La kaprica preserara diablo faris sian laboron! En la antaŭa numero de nia organo ni sciigis ke la malalta kongreskotizo de gld. 19.— k.t.p. validas ĝis 31.VII.1953. La bona leganto certe komprenis, ke la ĝusta dato estas 31.XII.1953. Bone notu! Vidu la oficialan bultenon!

**Bultenoj kaj aligiloj:** La unua oficiala bulteno kun aligilo estas aldonitaj al ĉi tiu numero. Pluraj estas mendeblaj ĉe supre-menciita adreso. Bonvolu aldoni poŝtmarkon (2-cendan) por la afranko.

**Baza kapitalo:** Multaj L.E.E.N.-geanoj ne jam partoprenas la bazan kapitalon; ĉar la 39a U.K. efektive okazos en Haarlem ne plu ekzistas la malhelpaĵo. La minimumo estas gld. 2.50. Ĉiu subtenanto ricevos atestilon kaj havos la certecon ke li povos aliĝi al la kongreso. Oni pagu ĝire al Ned. Esperantisten-Vereniging L.E.E.N., Amsterdam, poŝtkonto 34563. Anticipe dankon!

**Kontoj de la Kongreso:** Krom la konto menciita en la unuaj komunikoj, ni malfermis poŝtĝirkonton speciale por la nederlandanoj. La numero estas: 604997.

**Helpantoj:** Por la diversaj ampleksaj laboroj antaŭ kaj dum la kongreso ni bezonas multajn helpantojn. Pluraj anoncis sin jam antaŭ 2 jaroj, sed estas preferinde, ke ili informu la L.K.K., ĉu ilia deklaro ankoraŭ validas. Komprenable la L.K.K. volonte akceptos la helpojn de ĉiuj ajn, prefere el la ĉirkaŭaĵoj de Haarlem (Amsterdam, Haarlem, Alkmaar, Hilversum, Bussum, Leiden, Den Haag, k.t.p.). Kunhelpu, por ke la aranĝo fariĝu modela!

**Loĝado:** Por la multaj eksterlandanoj atendotaj ni bezonas ĉiujn disponeblajn loĝejojn. Tial ni petas al la partoprenantoj el la ĉirkaŭaj lokoj (Amsterdam, Leiden, Den Haag) ne mendi loĝejon en Haarlem. Se eble oni gastigu eksterlandanon.

**Aliĝoj:** Jam aliĝis kelkaj personoj. Ni bone konservas la aliĝilojn (validantojn nur kun samtempa pago). La kongreskarton ni forsendos post alveno de la Konstanta Kongresa Sekretario, komence de oktobro. Do iom da pacienco, ni petas kaj ne korespondu pri tiu afero.

**GRAVE:** Por ŝpari lokon kaj tempon ni ne ripetos niajn informojn. Sekve oni bone legu kaj relegu ilin. Aldonu poŝtmarkon por la respondo, se vi ŝatas ekhavi specialajn informojn. Anticipe dankon!

L.K.K.

amikoj faros ĉion necesan por sukcesigi la laborojn de la 38a U.K. Vi jam mem povis rimarki ke en la urbo kaj precipe en nia kongresejo regas vere internacia agordo. Ankaŭ la ekstera publiko kun evidenta scivolemo kaj intereso atendis la komencon de la kongreso kaj ĝi la saman intereson montris dum la kongresaj tagoj. „Post esprimado de dankvortoj al ĉiuj oficialaj instancoj, li dankas la kongresanojn, kiuj“ per tiel multnombraj aliĝoj helpis nian laboron, kaj kiuj bedaŭris nek tempon nek monon por veni al Zagreb, eĉ el la plej malproksimaj landoj. Nin atendas granda laboro, kaj nur nia komuna kaj konkorda serioza laboro estos la plej bona garantio por la fina sukceso de la 38a U.K. de Esperanto“. Sekvis lin francalingve (tradukis s-ro Petit), la UNESCO-observanto s-ro Lebar. Li skizis la rolon de UNESCO kaj diris i.a. „la digneco de UNESCO postulas la disvastigon de la kulturo kaj de la edukado de ĉiuj homoj en la senco de justeco, libereco kaj paco. Jen la devoj sanktaj plenumigendaj de ĉiuj nacioj en spirito de senvorta helpemo“.

Kaj li daŭrigis poste „Sed la idealo al kiu vi dediĉas vian fervoron, postulas la aplikadon de universala lingvo. Ĉu ni ĉiuj, malgraŭ la malsama deveno, ne ege deziras labori por plia alproksimiĝo de la homoj, malgraŭ ĉiuj bariloj kiuj disigas ilin, labori por la forigo de la antaŭjuĝoj, kiujn kaŭzas la nescio, labori por la idealo de solidareco kaj komprenemo internaciaj? Kiel vi scias, la konferenco ĝenerala de UNESCO komisiis la direktoron ĝeneralan transdoni al la ŝtatoj aliĝintaj al nia organizo la tekston de la petskribo internacia por Esperanto. Ĉi-kune oni petas ilin sciigi ilian opinion pri tiu peticio. Okaze de la proksima kunsido de la ĝenerala konferenco en Montevideo, kiu okazos en oktobro 1954, oni devos grandlinie kaj sur la bazo de la ricevita informoj decidi, kion oni entreprenu koncerne Esperanton. Kun granda scivolemo kaj simpatio ni sekvas vian laboron en tiu gastama kaj spirite tiel vigla lando. Permesu ke mi transdonu al vi en la nomo de la ĝenerala direktoro de UNESCO la plej ardajn

dezirojn por la sukceso de tiu mondovasta kaj frata internacia arigo de bonvolemo“. Estas evidente ke tiaj paroladoj ricevis tondrajn aplaŭdojn flanko de la kongresanoj. Post tio salutis la kongreson la reprezentantoj de la registaroj aŭstralia, aŭstra, belga, franca, nederlanda, norvega, svisa, sveda kaj novzelandaj, same kiel la delegitoj de 19 naciaj esperantistaj organizoj.

Kaj jen staris antaŭ la ĉeestintoj nestoro de la movado, la konata kaj simpatia Prof. d-ro E. Privat, por eldiri la festparoladon. En flua, belsona Esperanto, uzante simplajn vortojn kaj frazojn, li akcentis ke li dum sia 50-jara esperantisteco vizitis Jugoslavion plurfoje kaj esprimis ĝojon, ke la kroatia nacio kune kun la aliaj jugoslaviaj nacioj havas rajton diri sian vorton al la homaro. Poste li parolis pri la tri epokoj de nia movado kiujn li vidis: la unua kiam ni esperantistoj ankoraŭ ne rajtis paroli al la homaro, la dua kiam Hektor Hodler fondis U.E.A. kaj la tria kiam ni post terura ventego ree devis labori kaj ĉion rekonstrui. Li aparte substrekis tiun kulturalan rekonstruon al kiu devas celi nia laboro. En UNESCO-li diris- oni konsideras nian movadon kiel armeon de malriĉaj humilaj homoj kiuj faras grandan laboron. Ĝuste tiu fakto estas la ĉefa kaŭzo de ilia intereso pri internacia lingvo, kiu ne devas esti monopolo de intelektuloj, sed ĝi devas stari je dispono al grandaj amasoj havantaj pli da sperto ol la limigitaj mensoj de multaj - ne de ĉiuj - intelektuloj. Kiam d-ro Zamenhof kreis Esperanton, li pensis al ĉiuj homoj, sed precipe al homoj humilaj kaj kun homeca sento. Kaj d-ro Privat finis jene: „Spite al ĉiuj sukcesoj ne pensu ke ni morgaŭ ricevos la oficialan rekonon. Longan laboron mi profetas al vi. Instruu la lingvon al junuloj ke ankaŭ ili festu sian 50-jaran jubileon. Notu bone ke neniu povos mortigi tiun lingvon kiu havas kaj kunportas la spiriton de Zamenhof, kiu estas la spirito de la homaro“. Tiuj vortoj impresis la kongresmaron kaj la longa aplaŭdo montris, kiel oni ŝatis ilin.

Entuziasme oni kantis la esperanto-himnon kaj finiĝis la inaŭgura ceremo-

## AAN DE SLAG!

Wanneer dit nummer verschijnt, behoort de vacante al weer tot het verleden en wordt het hoog tijd, dat de afdelingsbesturen zich beraden op het werk, dat hun de komende maanden te doen staat. Het feit, dat het Wereldcongres in 1954 in Haarlem gehouden zal worden, zal zeker een steun zijn, bij de te voeren propaganda. Wat de propaganda betreft geven we de raad nogmaals kennis te nemen van de artikelen van prof. I. Lapenna in „Esperanto“ blz. 193-205, jaarg. 1952 en het artikel „Kion fari?“ van onze redacteur in ons eigen orgaan, Sept. en Oct. 1952. Wij beschikken nog over een voorraad affiches met tekst „Gaat met Uw tijd mee, leert Esperanto“, met een grote groene ster en ruimte voor eigen aankondigingen. Prijs per stuk fl. 0,02. Voor brochures raadpleeg men de advertentie van onze boekendienst. Onze persdienst kan bij de propaganda nuttig werk doen, maar deze dienst kan alleen goed functioneren, als de afdelingen en actieve alg. leden de nodige medewerking verlenen. Het is niet de eerste keer, dat we hierover schrijven, en het zal ook wel niet de laatste keer zijn... Ook over de „inwendige zending“, het samenstellen van afwisselende en interessante programma's voor de afdelingsbijeenkomsten heeft prof. Lapenna het nodige gezegd en ook wij hebben daar in ons blad meermalen aandacht aan gewijd. De afdelingsbijeenkomsten moeten erop gericht zijn, de leden zoveel mogelijk gelegenheid te bieden, het Esperanto praktisch toe te passen. Het alg. secretariaat beschikt over verschillende brochures, geschriftjes, etc. over het organiseren van afdelingsbijeenkomsten en cursussen en over sketches, toneelstukjes enz. om de taak van de afdelingsbestuurders te vergemakkelijken. Raadpleeg ook de sprekerslijst van N.C. K.E. Naast cursussen voor beginners worden natuurlijk conversatiecursussen georganiseerd. Omtrent geschikte leerboeken verwijzen we naar de mededelingen van de boekendienst. In dit verband wijzen we ook op de examens ter verkrijging van diploma M, die in 1954 voor het eerst zullen worden afgenomen. Maak Uw kennissen, die niet in de gelegenheid zijn een mondelinge cursus te volgen attent op onze uitgebreide schr. cursus voor beginners, die inclusief individuele correctie slechts fl. 12,50 kost. Het prospectus is gratis verkrijgbaar bij ons secretariaat. Voor het luttel bedrag van fl. 1,— ligt ons blad een jaar lang ter inzage in openbare leeszaal enz. De normale abonnementsprijs voor niet-leden bedraagt fl. 2,75. Over de propagandistische waarde van „De Esperantist“ schreven we reeds meermalen, maar nog steeds blijkt het nodig, dit uitstekende propagandamiddel opnieuw onder de aandacht van onze functionarissen te brengen.

In dit artikel hebben we slechts enkele „tips“ gegeven, omdat we anders te veel in herhaling zouden moeten vervallen. Voor ieder is er in de komende maanden en ook later wel iets te doen. Sta klaar, wanneer Uw afdelingsbestuur een beroep op U doet! Aan de slag!

A.K.

nio. Kaj elirinte la salonegon oni sentis la sunbrilegon, kiu ankaŭ dum la sekvintaj tagoj ofte ŝvitigis la gekongresanojn.

Dum la tuta semajno amasigis la kutimaj laborkunsidoj, festarangoj, prelegoj k.t.p., kiuj fakte plejgrandparte estas rutinaj. En la kadro de ĉi tiu raporto ne eblas priskribi ĉiujn. Tial estas menciataj jenaj faktoj.

La Internacia Somera Universitato ĉi-jare estis denove ege interesiga. Prelegis diversaj universitataj profesoroj kaj aliaj personoj el 7 diversaj landoj pri variaj temoj. Rektoro estis Prof. D-ro Josip Badalić, membro de la Jugoslavia Akademio de Scienco kaj Artoj. Inaŭgurante la sesan laborperiodon de la I.S.U. li akcentis ke jam en la jaro 1891 la fama lingvisto jugoslavia Prof. Tomo Maretić en solena kunsido de la Akademio legis sian valoran pristinon: „Pensoj pri la artefarita mondlingvo“. Laŭ la opinio de Maretić neniu vivanta lingvo povas alpreni la rolon

de neŭtrala mondlingvo kaj tiam li diris laŭvorte: „Ne estas dubo, ke la neŭtrala mondlingvo glatigus inter unuopaj popoloj multajn kverelojn kaj miskomprenojn, ĉar ili pli bone ekkonus unu la alian, kaj ĝuste en tio kuŝas unu el la plej grandaj bonfaroj de la mondlingvo”. Prof. Maretić i.a. substrekis la avantaĝojn de Esperanto, kaj sciante ke en tiu jaro la esperanto-movado ankoraŭ estis en embria periodo, oni povas alte taksi la valoron de la citita konstato de tiu kroata filologo. La rektoro finis sian paroladon per jena aklamado: Vivat, crescat, floreat alma mater esperantista! (Vivu, kresku, floru la esperantista universitato).

Kiel kutime la estraro kaj komitato de UEA grave laboris, ĉar la tagordo estis tre ampleksa. Kun granda intereso la observanto de UNESCO sekvis la diskutojn kaj laŭdis la procedon de niaj kunvenoj, kiu en internaciaj konferencoj diverslingvaj, certe prenis tagojn kaj tagojn pro la tradukoj k.t.p. Post kelkhora ĉeesto s-ro Lebar eĉ grandparte komprenis la esperantan lingvon kaj li akcentis ke la tuta kongreso multe impresis lin.

Menciinde estas ke la Akademio de Esperanto por la unua fojo en la historio de Esperanto okazigis publikan kunvenon, en kiu oni preparolis diversajn lingvajn problemojn. La kunsido estis sukcesa kaj ni esperu ke la Akademio daŭrigos tiajn kunsidojn en venontaj internaciaj aranĝoj.

La artaj vesperoj estis altnivelaj. Oni prezentis enlandajn muzikon kaj kantojn, cetero naciajn dancojn en plej diversaj riĉkoloraj kostumoj. Speciale la viglaj dancoj ege impresis la kongresanaron en la varmega tutplena salono kaj oni povas nur bedaŭri ke ne estis okazo prezenti ilin en la plenaero, ĉar tiel la ĝuado estus estinta ankoraŭ pli granda.

La ekskursaj tago disigis la ĉeestintojn en tri diversaj direktoj, al la urbo Samobor, al la belaj lagoj kaj akvofaloj de Plitviĉe kaj al Kumrovec, la naskiĝloko de Marŝalo Tito. La akcepto en Samobor estis grandioza. La stadidomo estis ornamita, la ĉefan placon ornamis triumf-arko kun la surskribo „Bonvenon al Samobor”. Oni prezentis muzikon kaj dancojn kaj la urbestro persone alparolis la kongresanojn esperantlingve. La regiono de Plitviĉe ankaŭ altiris grandan aron de kongresanoj, kiuj sentis sin tie kvazaŭ en paradizo. La multaj lagoj kun centoj da akvofaloj, kuŝantaj inter arbarita montaro, ja montras la belegan naturriĉecon de Jugoslavio. Oni admiris, promenis, naĝis kaj remis kaj nur kontraŭvole forlasis tiun admirindan regionon.

Vendredon la urbestro de Zagreb akceptis en la urbdomo centon da kongresanoj, reprezentantoj de diversaj landoj, estraranoj kaj komitatanoj de UEA kaj aliaj eminentuloj. Laŭ tute senĝena maniero la ĉeestintaro estis regalita per ĉiaj sandviĉoj kaj trinkaĵoj, inkluzive la konatan turkan kafon.

En la solena fermo je sabato oni publikigis la novelektojn en la estraro de UEA kaj aplaŭde akceptis jenan rezolucion:

„La 38a Universala Kongreso de Esperanto apelacias al la naciaj kaj internaciaj oficialaj instancoj serioze konsideri la praktikan valoron de Esperanto kiel internacia komprenilo. Kun kontento ni registris la intereson pri Espertanto de UNESCO kiu al la Zagreba kongreso sendis observanton. Ni atendas ke la koncernaj aŭtoritatoj en la diversaj membroŝtatoj de UNESCO plej detale kaj sen antaŭjuĝo esploru la jam atingitajn rezultojn kaj la eblecojn de la lingvo, kaj ke ili faru al UNESCO konkretajn proponojn por la utiligo de ĉi tiu plej valora kaj praktika solvo de la monda lingvo-problemo”.

Cetero oni konigis la rezultojn de la oratora kaj belartaj konkursoj. La prezidanto de la LKK 39a U.K. Haarlem invitis ĉiujn al Nederlando kaj post dankvortoj de d-ro Borovečki al ĉiuj, kiuj iel kunlaboris al la sukcesoj de la U.K. en Zagreb, de s-ro Hans Jakob al s-ro Malgrem kaj la edzinoj de la senlace laborintaj estraranoj kaj komitatanoj, la prezidanto fermis la lastan kunvenon. Kaj per komuna kantado de la esperanta himno finiĝis la 38a en Zagreb.

Postrigardante oni povas kun ĝojo konstati ke la kongreso bonege sukcesis. Malgraŭ varmega vetero ĉiuj ĝuis kaj estis kortuŝitaj pro la maniero, laŭ kiu la Zagrebaj kaj jugoslavaj geamikoj akceptis ilin. La senlace laborantaj laboregis kaj ŝvitis tage kaj nokte, nur por helpi kaj komplezi al ĉiuj ĉeestintoj. Varman, elkoran dankon meritigas ĉiuj kaj . . . . . ĝis revido en Haarlem!

Multaj kongresanoj kaptis la okazon por partopreni iun ajn postkongresan plurtagan ekskurson. Jugoslavio estas dorlotita de la naturo kaj ĉar ĝi situas inter la okcidentaj kaj orientaj kulturlandoj ĝi prezentas multege da belaj konstruaĵoj kaj artaĵoj. En kelkaj lokoj, ekz. Pula kaj Ljubljana, la post-

kongresanoj estis varme akceptitaj de la lokaj geesperantistoj. Kaj estas sendube ke multaj el ili farigis intimaj amikoj de la eksterlandanoj. Ni fine esperu ke iam denove okazos U.K. en

Jugoslavio por ankoraŭ pli funde ekkoni la landon kaj afablan popolon kaj ke la okazinta 38a alportos al la tiea movado multajn sukcesojn!

P. M.

# LA STUDANTO

Vertalingen van de opgaven in het vorige nummer:

## Oefening 9 A:

### KIO

1: Kio kuŝas tie sur la tablo? 2: Tio estas nur iom 1) da 2) paperaĵoj. 3: Tion, kio 3) estas senutila, vi pli bone povas forjeti. 4: Ĉu mi jetu 4) ĉion, kio 5) kuŝas sur la tablo, en la fornon 6). 5: Tio, kion 7) ni ankoraŭ povos 8) uzi, restu kuŝanta 9). 6: Kiaj 10) paperoj kuŝas tie sur la planko? 7: Kiom da 11) paperoj falis 12) sur la plankon 6)! 8: Kia haoso! 9: Kion vi forjetas (tien)? 10: Ho, tio estas pak(a)jo da vato(j) 13).

## Opmerkingen:

1: „Wat” duidt hier een onbepaalde hoeveelheid aan als antwoord op de vraag: „Kiom?”

2: Tussen een „iom”-correlatief en het daardoor bepaald en daarop volgend zelfstandig naamwoord dient het voorzetsel „da” als „bruggetje” te staan.

3: Hier is het woordje „wat” een betrekkelijk voornaamwoord met ingesloten antecedent, d.w.z. dat het tegelijk antecedent en betr. v.n.w. is. Men kan het vertalen met „kio” of „kion”, als het zowel als antecedent als betr. v.n.w. in dezelfde naamval staat. Is dat niet het geval (zoals hier), dan moet men de vorm „tio, kio” gebruiken: het antecedent „tio” krijgt een n, als het bepaling zonder voorzetsel is in de hoofdzin. En „kio” krijgt een n, als het bep. z. voorz. is in de bijzin (zie zin 5 en noot 7).

4: Beter dan „jetos”. Het antwoord op deze vraag is immers een raad of bevel. Daarom bij voorkeur: „jetu”.

5: Als het antecedent (hier: ĉion) een io-correlatief is, dient het betrekkelijk voornaamwoord „kio(n)” te zijn. Dit is ook het geval, als het antecedent de inhoud van de gehele hoofdzin is. En kelkaj landoj oni mangas ran-femurojn, kio ŝajnas al mi stranga kutimo.

6: Richtings-n.

7: Ook hier is „wat” betr. v.n.w. met ingesloten antecedent. Zie noot 3.

8: Beter dan „povas”, want het gebruik licht in de toekomst.

9: Ook: restu. Ook: devas resti.

10: Wat voor (soort) = kia(j).

11: Wat een — wat een grote hoeveelheid = hoeveel = kiom. Zie noot 2.

12: Ook, maar minder eenvoudig en minder elegant: estas faliĵaj

13: (Verband)watten = vato(j).

## Oefening 7 B:

### DREVES UITTERDIJK (IV)

Kio plu evoluis el la pionira laboro de la nelacigebla antaŭbatalanto D.U., estas legebla 1) en „H. kaj O. de la Esp.-movado” de i-ro 2) J.R.G. Isbr., kiu verketo estas havebla 3) ĉe nia libroservo.

Fine ni volas ankoraŭ citi kelkajn ĉarmajn 4) anekdotajn detalojn el letero de frato de D.U., s-ro W. Uitterdijk en Bennekom, kiu mallonge post la skribado de ĉi tiu letero mortis 5). Jen do la citaĵo:

„Per nia komerca navigado 6) mia frato Dr. vojaĝis al Levanto. Li revenis en vojaĝkostumo kun ĉiaj kruĉoj kaj ujoj kaj testudo ĉe si. Onklo de mia fianĉino (kantona juĝisto en A.) tiam venis al ni (vizitis nin) kaj rakontis, kian strangulon 7) li vidis en la tramo. Guste en tiu momento D. staris antaŭ la pordo por porti al la patrino de mia fianĉino kruĉon da 8) Samos-vino. Tiel la aristokrata (grandsinjora) juĝisto do revidis tiun „strangulon” pli proksime.

En Leeuwarden Dr. foje ekhavis homamasigon malantaŭ si, kiam li post vojaĝo en Algerio promenis al Roodkerk en dezerta vesto” 9).

## Opmerkingen:

1: Ook: „Tion, kio plu evoluis . . . , ni povas legi . . . .” Ook: „Pri tio, kio . . . , ni povas legi”. Zie opm. 3 bij vertaling van oef. 9 A hierboven.

2: Verkorting van „ingeniero” zoals „s-ro” van „sinjoro” enz. Ook: „ing.”

3: Ook: akirebla, aĉetebila.

4: Ook: plaĉajn, kuriozajn.

5: Niet: estas mortinta. De tijdsbepaling eist hier een verleden tijd.

6: Ook: Per unu el niaj komercaj ŝipoj.

7: Ook: strangan viron. Niet: fremdan = nekonatan.

8: Let op het voorzetsel „da” na een hoeveelheid-aanduidend zelfst. n.w.

9: Ook: en vesto de dezertano.

## NIEUWE OPGAVEN

### Oefening 10 A:

Vertaal in 't Esperanto:

### DAT

1: Dat is een moeilijke oefening. 2: Vind jij, dat dat oefeningetje moeilijk is? 3: Dat meen ik inderdaad. 4: Dat veroorzaakt dat ene woordje, dat telkens weer anders vertaald moet worden. 5: Dat begrijp ik zelf ook wel. 6: Maar begrijp je dat woord zelf ook? 7: Ik denk wel, dat dat me duidelijk is. 8: Vindt U ook niet, dat dat oefeningetje, dat dat Nederlandse woordje „dat” behandelt, nuttig is? 9: Dat is het zeker; dat moet ik wel toegeven. 10: Laten wij dan nu maar over ditjes en datjes spreken.

### Oefening 8 B:

Vertaal in het Esperanto:

### TE ZINDELIJK

Nederlandse huisvrouwen gaan voor zindelijk door, maar in het buitenland was een vrouw, die de waterkraan van binnen wilde schoonmaken. Zij stak er een vinger in om toch vooral maar geen vuiltje te laten zitten. De vinger raakte zo vast, dat zij hem niet meer kon terugtrekken. Eerst werd de brandweer geroepen om te trachten haar te bevrijden. Die wist niet beter te doen dan de kraan af te zagen en de vrouw naar het ziekenhuis te brengen. Daar wisten ze er ook geen raad mee. Ten slotte is een loodgieter er in geslaagd de kraan van haar vinger te krijgen.

Huisvrouwen, weest voorzichtig!

Uitwerkingen van Vlaamse Esperantisten vóór 10 Sept. 1953 aan V.E.B., „Studento”, postbus 100, Mechelen; van Nederlandse aan S.S. de Jong Dzn, Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.).

Wie een gefrankeerde enveloppe voor terugzending erbij voegt, krijgt het werk gecorrigeerd terug.

## Esperanto-Leerboekje

voor de Lagere School en voor hen, die geen ander dan lager onderwijs genoten, I en II, door H.A. Appel. Pr. per deeltje F. 1,50. Cursusl. ontv. gratis exempl. Ook geschikt gebleden voor cursussen aan volwassenen. Gunstige beoordelingen. Best. aan Libro Servo „L.E.E.N.” Z.O.-Singel 5, Bergen op Zoom.

## IETS OVER KRANTENCURSUSSEN

Men heeft mij verzocht, iets te vertellen omtrent onze ervaringen met de publicatie van een Esperanto-cursus in onze bladen. Hieraan voldoe ik gaarne, daar wij door deze lessen gedurende de laatste drie jaren niets anders dan dankbare sympathie bij onze lezers en daarbuiten hebben ontvangen.

Wel was het aanvankelijk met wat schroom, dat wij er toe overgingen. Doch reeds binnen enkele dagen werd het ons duidelijk, dat deze cursus bij onze lezers zeer in de smaak viel getuige de honderden deelnemers uit alle steden, dorpen en gehuchten van ons verschijningsgebied. De mondelinge lessen, welke door de cursusleiding werden georganiseerd en waar wij als krant met onze abonné's in contact werden gebracht, werden steeds door een enthousiaste schare cursisten bezocht en zonder uitzondering verklaarden dezen ons na afloop veel van zo'n mondelinge eerste les te hebben geleerd.

De algemene reünie op Hemelvaartsdag gaf ons de overtuiging, dat wij iets waren begonnen, dat zeer zeker door ons zal worden voortgezet en liefst niet alleen door ons, maar ook door andere bladen kan en dient te worden nagevolgd.

Daar wij volledig de waarde van de internationale taal onderschrijven en consequent aan haar verbreiding willen meewerken, stellen wij ons gaarne bereid, alle inlichtingen betreffende de cursus aan hen te verschaffen, die menen, dat iets dergelijks in hun woonplaats bij hun krant ook kan plaats vinden.

J. A. Wit, alg. redacteur Dagblad voor de Zaanstreek „De Typhoon” Nieuwe Noordhollandse Courant Noord-Amsterdammer.

Jen, karaj gelegantoj, kelkaj citaĵoj el letero de redaktoro J. A. Wit. Konigu lian opinion al redaktoroj de gazetoj en via distrikto, rakontu al ili pri la okazinta mondkongreso en Haarlem kaj instigu ilin imiti la bonan ekzemplon!

## MEDEDELINGEN VAN ONZE BOEKENDIENSTEN

WINTERTIJD: studie- en propagandatijd. Onmisbaar voor de propaganda:

	Gld.	Belg. Fr.
Esperanto, de werelddhulptaal	0,03	0,50
Richtlijnen voor het onderwijs van Esperanto op de school	0,02	0,25
Studieboeken voor beginnerscursussen:		
H. Bakker: Esperanto in 20 lessen	3,—	36,—
Dirksen: Methodisch leerboek	1,25	17,—
G. P. de Bruin: La komencanto	1,50	
Zondervan en Manders: Esperanto leerboek voor de Kweekschool, ULO en Middelbare scholen	2,50	34,—
Voor gevorderden: opleiding examens:		
Benink: Leerboek Esperanto	2,10	30,—
Faulhaber: Tra la laborinto de la gramatiko	5,90	85,—
G. J. Degenkamp: De voorzetsels	1,50	26,—
La konsilanto pri la E-gramatiko	2,75	36,50
Leidraad bij de studie de E-literatuur	0,45	6,50
Esperanto 60-jara	1,75	20,—
de Bruin & Faulhaber: Post la kurso	1,50	
E. Privat: Historio de la lingvo Esperanto I	1,50	22,—
Historio de la lingvo Esperanto II	2,75	45,—
Vivo de Zamenhof	3,25	40,—
Stop-Bowitz & Isbrucker: La Esperanto-movado	2,—	
C. P. de Bruin: Gvidilo tra la Esperanto movado	0,95	13,—
Io pri la Esperanto historio	0,25	
W. F. Kruit: Lingvo kaj movado	0,55	
Honderd vragen over gramatica en onderwijs	0,35	5,—
Hoe kan ik het in Esperanto zeggen?	0,25	5,—
Esperanto leren lezen (G. F. Makkink)	1,—	15,—
Vortoj kaj esprimoj por komencantoj (Zondervan)	1,15	15,50
Komercaj leteroj (C. W. Pruisen)	1,30	14,—
Esperanta Krestomatio (Nederl. Centra Komitato)	1,95	24,—
Fundamento de Esperanto (zonder vertaling)	0,75	
Fundamento de Esperanto (met vertaling)	0,90	10,—
Fundamenta Krestomatio (Zamenhof)	5,20	85,—
Voor de Jeugd cursussen:		
H. A. Appel: Esperanto leerboek v. d. Lagere school I	1,50	20,—
idem II	1,50	20,—
P. Korte: Sub la verda standardo (gvidilo onderwijzer)	2,50	
idem Laborilo I	0,80	12,50
idem Laborilo II	1,—	12,50
idem Memorigilo	0,65	
Woordenboeken:		
Alings: zakwoordenboek F.L.E. (E-Ned. & Ned-E.)	0,50	
Debrouwere: zakwoordenboekje id		5,—
Schlidlof's zakwoordenboek	2,15	45,—
Plena vortaro	11,50	175,—
Enkele recente uitgaven:		
Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto (Stojun)	2,25	30,—
Katolika preĝlibro	5,—	65,—
Papo Pio X, beata (kun multaj bildoj)		30,—

## MENDU ĈE

Libro-Servo LEEN, Z.O. Singel 5, Bergen op Zoom  
Vlaamse Esperanto Instituut, Blankenbergse steenweg 72, Brugge

**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:  
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.  
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. postrek. 34563,  
Boekdienst. schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5,  
Bergen op Zoom, postrek. 76915.  
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp  
Cedel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.  
Vic-efed. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

**Komunikoj de la ĉefestraro**

Por faciligi la laboron de la ĝen. kasisto (kiu ja estas samtempe prezidanto de la L.K.K. en Haarlem) la sekcijaj gekasistoj baldaŭ pagu la kontribuon por la dua duonjaro kaj tiun de la lastatempaj aligitaj gemembroj. Anticipe dankon!

La ĝen.kasisto estas preta prelegi pri la 38a U.K. en Zagreb kaj pri la kutimoj kaj la lando de la Jugoslavio popolo, sed nur post la unua de oktobro. Povas esti montrataj fotoj de la lando kaj de la naciaj kostumoj pere de epidiaskopo, kiun la sekcioj mem luu, se ili ne jam posedas tian aparaton. Kondiĉoj: nur repago de vojaĝ-kostoj. Sekcioj, maĵproksime de Amsterdam, prefere aranĝu je iu sabato.

Wij maken onze gevorderde leden nogmaals attent op het interessante werkje van P. Stojan „Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto”, waarover in het vorige nummer (Juli-Aug. 1953) een uitvoerige recensie is verschenen. Prijs slechts fl. 2,25. Afdelingen genieten bij bestelling van ten minste 3 ex. een korting van 10 %. Bestellingen aan de boekendienst.



La bildo prezentas parton de la kursanaro de la Esperanto-kurso en la Popol-universitato en Hago, kun en la mezo mag. S. Pragano, la docento. La foto estas farita dum festvespero, kiun la hoga sekcio de la Nederlanda Esperantista Asocio „La Estonto Estas Nia” al la kursanoj oferis.

**Internationale integratie en taal. Een geslaagd experiment. Esperanto-Wereldcongres 1954 Nederland.**

Men schrijft ons uit Den Haag:  
Mevr. Dr T. Peter-Ruetschi uit Zürich zal vermoedelijk niet verwacht hebben, dat haar initiatief om te komen tot met-het-buitenland gecoördineerde cursussen in de internationale taal Esperanto zo zeer zou inslaan.

De gedachte welke voorzat bij haar streven was die betreffende de noodzaak mede te werken aan de taal-integratie op internationaal en mondiaal niveau. Tot dusver worden n.l. in het algemeen in het wereldverkeer allerlei nationale talen, dus talen voortgekomen uit en verbonden aan nationale cultuurgemeenschappen, gebruikt als internationale hulptalen, uiteraard met de verschillende bezwaren en problemen aan een en ander verbonden. Alleen het gebruik van de uit internationale taaltendenzen ontstane taal, welke dus door haar eigen aard en wezen een internationale functie heeft, geeft hier de juiste oplossing.

Verskillende volksuniversiteiten in Europa hebben aan de uitvoering van bovenvermeld initiatief medegewerkt door in de afgelopen winter studieklassen voor Esperanto te openen aan welke honderden cursisten met succes hebben deelgenomen, een en ander in contact met de Volksuniversiteit te Zürich, welke als centraal punt optrad. Deze studieklassen omvatten tevens een internationaal experiment in het kader van bevordering der rechtstreekse contacten tussen personen van verschillende nationaliteit: de deelnemers zijn na de eerste cursusmaand met elkander in briefwisseling getreden om de grondslag te leggen voor vriendschappelijke betrekkingen. Dat deze ontstonden bleek wel uit de ontvangen

bewijzen van medeleven naar aanleiding van de watersnood van begin Februari.

De betrokken volksuniversiteiten in alfabetische volgorde vermeld, zijn die te Florence, 's Gravenhage, Helsinki, Karlstad, Kopenhagen, Manchester, Parijs, Parma, Salzburg, Stuttgart en Zürich dus gelegen in acht verschillende taalgebieden: Fins, Zweeds, Engels, Nederlands, Frans, Duits en Italiaans.

De Volksuniversiteit van 's Gravenhage heeft er toe medegewerkt, dat een internationaal gecoördineerde cursus ook in onze stad, welke zo zeer internationaal is georiënteerd, kon worden gehouden. Als docent treedt op Mr Sigismundo Pragano, lector aan de Universiteit van Amsterdam, een van de beste internationale docenten die de Esperanto-beweging kent. Het onderwijs vond plaats volgens de bekende Cseh-methode, welke een demonstratie is van de deugdelijkheid van de directe methode, toegepast op een taal met een eenvoudige en logische grammatica.

Het eerste gedeelte van de cursus werd besloten met een feestelijke samenkomst in Pulchri, aangeboden door de afd. Den Haag v.d. Ned. Esperanto-vereniging „La Estonto Estas Nia”

(secre. Anjelierstraat 10) welke bijeenkomst mede werd bijgewoond door het lid van de Raad van Bestuur van de V.U. de Heer D.J. Muller, voorzitter van Dept. 's Gravenhage Maatschappij Nijverheid en Handel. Mr A. J. Kalma, voorzitter van het Nederl. Centr. Esp. Comité, kon als een der inleiders mededeling doen over een zo juist ingekomen bericht n.l. dat in 1954 het wereld Esperanto-congres zal plaats vinden in Nederland met ongeveer 3000 deelnemers uit 27 verschillende landen. Mevr. J. Isbrücker sprak over Federalisme en taal.

Onder het motto „DE WERELD GAAT OPEN” zullen vele Nederlanders gaarne de kans aangrijpen ter gelegenheid van dit congres met tal van buitenlandse in persoonlijk contact te komen en relaties aan te knopen.

De adviesinstelling hier ter stede is daartoe de Ned. Esperanto-vereniging „La Estonto Estas Nia”, (Secre. Anjelierstr. 10) bij wie alle inlichtingen kunnen worden verkregen.

**Plaatselijk Nieuws**

Teatra Grupo „La Verda Masko” el Hago prezentos dimanĉon la 4-an de oktobro la aktualan teatraĵon de M. Dekker:

**LA MONDO NE HAVAS ATENDEJON**

(De wereld heeft geen wachtkamer) in „Doelenzaal”, Amsterdam-C.  
Komenciĝo posttagmeze je la 14-a h. Enirprezo gld. 1,—  
Enirbiletojn oni mendu ĉe s-ro J. Pouli, sekre. NCKE, Elegaststr. 19, Amsterdam.  
Mendu la teatraĵon ĉe nia libroservo kaj legu ĝin antaŭe, por ke vi pli bone komprenu la prezentadon! Prezo gld. 2,50.  
Ni atentigas pri la prezentado je lundo, la 28a de Septembro en Rotterdam en la teatro De Lantaren, Gouvernestr. 133.

(vidu la antaŭan numeron de N.E.)

**Flandra Ligo Esperantista.**

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.  
Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, Sint-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).  
Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.  
Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)  
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.  
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)  
Koresponda kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

**Estrara kunsido de la 13.6.53 en Gent:**

1. Propono de Sro Jaumotte, vicprezidanto de RBLE: tri membroj de ilia asocio, komisiita de la estraro, membrigu al Flandra Ligo, kaj inverse. Kvankam la estraro de FL.L.E. vidas en tiu propono nur simbolo, ĝi estis akceptita; la tri komisiitoj de nia asocio estas: Sroj Debrouwere, Roose kaj Van Gindertaelen; R.B.L.E. komisiis: Sroj Kempeneers, Jaumotte kaj Sielens.

El la koncerna letero mi ĉerpas la jenon (klarigas plej bone la vidpunkton de la proponinto): „Temas kompreneble, esence, pri ŝimpati-gesto. Sed mi „kredas, ke la fakto ke niaj estraranoj „estos reciproke membroj de la alia „Ligo, forigos ĉian ideon pri malamikeco, kontakto aŭ eĉ indiferenteco, ankaŭ ĉe la ordinaraĵ simplaj membroj „de niaj organizaĵoj kaj ankaŭ ĉe la „eksterstarantoj, kiuj tiel vidus klare, „ke se estas fakta duoko, tiu-ĉi tamen „neniel povas malhelpi al la bona akordigo kaj interkonsento inter ĉiuj esperantistoj en nia lando.”

2. Konstanta komitato de la kongreso: fondota inter la tri ligoj; la delegito flanke de la Flandra Ligo: Sro Maertens G. Tiu komitato konsilados la LKK.

3. Belga centra komitato Esperantista: fondota inter la du naciaj ligoj; kiel delegitojn la estraro indikis: Sroj Debrouwere, Maertens, Roose kaj Van Gindertaelen.

4. Komitatano de U.E.A.: por la venonta oficperiodo (tri-jara) FL.L.E.

proponis al UEA la kandidatecon de Sro Van Gindertaelen, sed samtempe proponis du oficialajn anstataŭantojn, nome Srojn Roose kaj Maertens.

5. Duonjara membreco al FL.L.E.: eblos ekde la julla numero, por 50 F.

**Esperanto-gazetoj.**

De preskaŭ ĉiuj nuntempe aperintaj Esperanto-gazetoj ni regule ricevas interŝanĝnumerojn. Unu ekz. de ĉiuj ni metas je la dispono de niaj gemembroj. Resendo ne necesas, krom se la sekretario speciale indikas tion. La listo de la gazetoj troviĝas en la jarlibro de UEA.

**Amikeco-kontrakto.**

50— membra Esperanto-grupo de Bremen invitas iun el la sekcioj de FL.L.E. por subskribi amikeco-kontrakton. Temas ĉefe pri interŝanĝo de leteroj, esperantaj kaj membroj. La kontrakto jam estas subskribita inter la grupo de Bremen unuflanke, la Esperanto-klubo de Karlskoga (svedujo) kaj la Londona Esperanto-grupo, aliflanke. La kontrakto estas havebla ĉe la sekretario.

**Familiaj membroj.**

Post miaj plendoj en la ĝenerala jar-kunveno en Antwerpen, ni enspezis tamen la kotizon por unu nova familia membro: Sino J. van Tuyckom, el Hemiksem. Ni tre dankas pro la bela gesto, kaj sendas tuj post la apero de ĉi-tiu numero paketon da Esperanto-gazetoj.

**KIAL NE EN NACILINGVO?**

En „Nederlanda Esperantisto” mi ĵus legis kun granda plezuro la unuan parton de recenzo pri nia libro „Kvaropo”. Tiu ĉi recenzo estas matura kaj profunde penetra, kaj mi tre dankas al s-ano Tyneverum pro lia altnivela kaj serioza taksado de nia verko. Li starigas plurajn tre interesajn demandojn, kaj li ankaŭ aludas sintenon, kiu farigis al mi sufiĉe konata, precipe depon la aperigo de „Kvaropo”. Nome, li citas la demandojn: „Kial ili ne estas poetoj en propra lingvo? Ĉu la riĉa nacilingvo ne prezentas al ili la deziratajn sonojn?” Multaj el miaj neesperantistaj amikoj, kiuj antaŭe rigardis mian esperantan verkadon kiel mildan frenezajon, jam por la impona aspekto kaj luksa prestelĥiko de nio volumo forte skuiĝis, kaj mire starigas al mi la supre prezentitajn demandojn. Por kontentige kaj konvinke respondi ilin, mi devis difini miajn motivojn, kaj mi opinias, ke eble la legantoj de via gazeto trovos interesa deklaracion pri tiuj motivoj. Kial kompetentaj verkistoj elektas Esperanton anstataŭ nacilingvon?

Efektive, s-ano Tyneverum misprezentas la kernajn demandojn. Ekzemple, mi respondus, ke Esperanto estas mia „propra lingvo”, eĉ pli „propra” ol mia denaska lingvo, ĉar tiun lastan mi hazarde akiris sed Esperanton mi propravole elektis. Kaj poezio ne estas ĉefe afero de „sonoj”, sed eĉ pli de signifo — kvankam verdire la sonoj de Esperanto ŝajnas al mi ĉentoble pli belaj ol la barbaraj sonoj de la angla lingvo, eĉ de la angla lingvo parolata de skoto. Tamen tiuj estas ĉikanetoj, kaj respondante la spiriton de la demandoj, mi trovas, ke miaj motivoj por elekto de Esperanto kiel mia verklingvo venas, kiel la skota skolo, kvarope:

(I) La ideologia motivo. Mi kredas pri la estonteco de Esperanto. Mi kredas, ke Esperanto estas la estonta lingvo de la homaro, kiu malrapide sed nepre evoluas de la familia unuo, tra la tria kaj nacia grupoj, ĝis la homa (tuthomara) grupo. Mi opinias, kun Zamenhof, ke la lingva, nacia kaj religia diferencoj estas (a) falsaj, kaj (b) la ĉefa baro al tuthomara socio. Mi kredas pri la nepra venko de nia lingvo; ĝi ne okazos baldaŭ, sed ĝi nepre okazos. Mi opinias, ke la esperantistoj jam nun formas rekoneblan sennacian homgrupon, kun propra kulturo kiu iam farigos la kulturo de la tuta homaro. Mi kredas, ke iam venos la Sekspiro, ia Dante, kiu faros per Esperanto tion, kion Sekspiro faris por la angla literaturo kaj Dante per kaj por la itala; kaj mi opinias, ke post 500 jaroj oni memoros mian nomon kiel oni hodiaŭ memoras la nomojn de malgravaĵ poetoj el la epoko, kiam la naciaj lingvoj kulture ekburgonis — ili estas la plinuroj, kiuj plej frue konstatis la latentajn fortojn de la kulture ankoraŭ malrespektataj lingvoj.

(II) La praktika motivo. Amikoj diras al mi, „Se vi verkus anglalingve viajn poemojn, vi atingus pli vastan publikon”. Granda eraro! Oni memoru, ke temas pri poemoj. Aŭtoro de eĉ mezkvailita anglalingva romano tre certe trovas pli multnombrian legantaron ol aŭtoro de eĉ pli altkvailita esperanta romano. Sed anglaj poetoj? La eldonkvanto de „Kvaropo” estas 3-4oble pli granda ol estus la eldonkvanto de tia volumo en angla lingvo. Kvankam milionoj parolas la anglan lingvon, la plimulto el ili parolas ĝin nur „lele, iome, duone malbone”. Nur mikroskope malgranda procento emas aĉeti poemaron aŭ eĉ legi ĝin, kvankam nur miloj parolas Esperanton, relative granda procento estas kulturaj homoj, kiuj estas pretaj eĉ legi bonajn poemojn, kaj volonte aĉetas (almenaŭ, ni tre sincere esperas tion!) poemaron se ĝi tion meritas. Mi vere opinias do, ke verkante en Esperanto mi eĉ atingas pli vastan publikon ol mi atingus per la angla lingvo.

(III) La poetika kaj lingvistika motivo. Mi trovas Esperanton pli poezie tauga lingvo ol la angla lingvo. Mi opinias, ke lingvoj, same kiel ĉio alia, evoluas, kaj ke la angla lingvo delonge preterpasis sian zeniton kaj jam diseriĝas kaj mortas. Sed Esperanto estas juna, elasta kaj adaptebla, kaj ĝiaj vortoj posedas precizon kaj esprimivon, kiujn ne plu posedas, pro eluzigo, kaj malpreziĝo, la nacilingvaj vortoj. Mi opinias, ke la poezio estas unuavice afero de precizaj difinoj, kaj por tio Esperanto estas aparte tauga. Ankaŭ la naciaj lingvoj taugis siatempe por tio; ankaŭ ili estis iam junaj, elastaj kaj adapteblaj. Nun ili estas rigidaj; oni nomas ilin riĉaj, sed ili sekvis la ordinaran vojon de troa riĉeco dum tro longa periodo: ili degeneras. Esperanto estas latente pli riĉa, kaj la eltrovado de tiuj latentaj riĉoj stimulas la poetan menson.

(IV) La nerespondebla motivo. Artverko estas produkto de pensoj kaj sentoj; ĝi estas provo doni videblan aŭ aŭdeblan formon al la mensaj spertoj. Artisto elektas por tio la rimedon, kiu plej taugas laŭ lia talento kaj personeco. Sed la elekto ordinare ne estas konscia; oni pentras aŭ komponas aŭ poezias ĉar tio estas al li „natura”. Ekzistas artistoj, kiuj uzas plurajn rimedojn — ĉar pluraj rimedoj estas al ili „naturaj”. Poeto uzas lingvon; kaj li uzas tiun lingvon, per kiu li spertas, t.e. pensas kaj sentas. Li ne spertas en unu lingvo kaj tradukas tiun sperton en alian lingvon por ĝin priskribi! Kaj mi spertas en Esperanto. Mi pensas kaj sentas plej profunde kaj plej nature en Esperanto. Sekve, se mi dezirus verki anglajn poemojn mi devus traduki miajn spertojn el Esperanto — kaj la poezio perdiĝus. Mi do poemas en Esperanto. Tre certe kelkaj eĉ entuziasmaj samideanoj miros aŭ malkredos

(vidu paĝo 4. 3a kol. sube)

**ANIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.**

PREMION akiris post n-roj 149/150: S-ro A. Pittoors, el *Deurne*, por V.E.B., kaj por L.E.E.N.: S-ro C.W.M. Baans, el *Velp*.

**SOLVOJ.**

151. Kio pasis, ne revenos. Pli bona estas malgranda „jen prenu“ ol granda „morgaŭ venu“.

152. Horiz.: brulum, furag, brut, cikoni, gap, ge, cikl, soci, pli, sat, kirl, gruo, em, gir, kapjes, muta, kaŝem, rentum.

Vert.: troig, akiraj, kest, fiuo, meĉ, cerbum, ambici, kokard, funkci, ŝut, pent, plej, balail, meduz.

**153. EL DU FARU UNU.**

tiel ke la unuaj literoj formas proverbon.

1. nu + venko; 2. pri + timo; 3. iri + dono; 4. si + tramo; 5. mi + grado; 6. lia + kelo; 7. tra + hufo; 8. po + etero; 9. la + vermo; 10. ree + famo; 11. sen + majo; 12. emo + reto; 13. tri + suno; 14. ĉio + rado; 15. tra + nomo; 16. dis + revo; 17. nia + moki; 18. da + regno; 19. nu + aroga; 20. al + kosto; 21. tre + tuko; 22. duo + kapo; 23. ano + jura.

**154. KRUCVORTENIGMO.**

Horizontale. 2. energie opozicii(R). 4. ilo altiranta fluaĵon(R); greno(R). 5. procentego(R). 6. senĉese(R); distingiga vesto de servisto(R). 7. mal-sana stato de animo(R); komenciĝi(R). 8. ĝi estas uzata por kunigi tabulojn(R). 9. ĝi troviĝas en preĝejo(R); miriga pro eksterordinareco(R). 11. kontinua.

Vertikale. 2. parto de vesto(R); ili dancas en sunradio(R). 4. ili restas post la falĉado(R); perdi sian koron(R). 5. ĉiuj membroj(R). 6. ludi per figuroj sur tabulo kun kvadratoj(R). 7. pagl monon por io akirita(R). 8. plugilo tranĉas ilin en la tero(R). 9. grupo de elektraĵ piloj(R); frukto(R). 11. malbone tranĉanta(R); subakvig(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G.J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al S-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 10/VII/1953.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1	R	S	C	E	R	E	N	E				
2	G	R	E	N	E							
3	L	I	A									
4	V	M	P	I								
5	A											
6			A	T								
7	S	O	L	E	N	E						
8	G	R	E	N	E							
9	L	I	A									
10	V	M	P	I								
11	C	E	N	E								
12	R	S	C	E	R	E	N	E				

**Kio la vivo estas ?**

Iun tagon, kiam la birdoj en la arbaro estis lacaj pro la kantado, alvenis fringo, kiu rompita la silenton per la filozofia demando: „Kio estas la vivo?“

Jes... jen ĉiuj aliaj terurigitaj ekrigardis pro ĉi tiu same neatendita kiel subita demando. Nur la alaŭdo rapid-refuta kiel ĉiam diris senprokraste: „La vivo estas kanto!“

„Ne, ne kriis talpo kiu ĵus rampis el la tero,“ la vivo estas batalo en la mallumo.“

„Mi opinias, ke ĝi estas evoluo“, diris rozoburgo, dum ĝi disfaldis siajn folietojn en la brilanta sunolumo.

Sed papilio kiu ekstaris sur ĝi, rigardis gojplene la belan rozoburĝon kaj diris: „La vivo estas gojo!“

Jen preterflugis melankolia muŝo, zumbante: „Prefere nomu ĝin mallonga somero!“

„Mia opinio, ĝi estas nenio alia ol penado kaj laborado“, gemis formiko trenanta de malproksime pajlospikon.

Motacilo scipovis fari nenion alian ol ridi kaj tute ne respondis. Sed verdire ĝi ridas nur por kaŝi sian mankon de penspovo. Subite ekfalas grandaj pluvetoj kaj intertempe ili flustris malĝoje: „La vivo konsistas el larmoj.“

„Ne, ne, vi ĉiuj nepre eraras,“ kriis aglo, kiu per trankvila batado de siaj flugiloj ŝvebis en la aero: „la vivo estas libereco kaj forto!“

Vesperigis kaj noktvento murmuretis tra la bruetantaj arbofolioj: „La vivo estas nur revo!“

Sur kampoj kaj vojoj, en urboj kaj vilaĝoj ekregis silento kaj paco kaj jam ree komencis tagiĝi kiam sola scienculo estingis sian lampumon kaj gemis: „La vivo estas nur lernejo“. Dum la trankvileco de la mateno aŭdigis helaj voĉoj. Kelke da gejunuloj reiris hejmen post fest-kaj gojplena nokto. Unu el ili diris oscedante verŝajne post forta debato: „La vivo estas konstanta deziro, kiu tamen neniam estos plenumata.“

„Ĝi estas eterna sekreto“, flustris la facila matenvento.

Solene la suno levigis. Ĝi orumis la arbopintojn, ĉirkaŭborderis la helgrizajn nubojn per ora brilo, superversis la teron per sia lumo kaj viviga varmo kaj kiam la brila taglumo kisis la vekigantan teron, estis kvazaŭ sonis plej harmonie tra la vasta mondo: „La vivo estas destino disdoni lumon kaj varmon.“

Kiom ĉi tiu malnova rakonto diras al ni!...

Esence ĉi, kiu diris sian opinion pravas tiom, kiom ĝi koncernas la propran vivkoncepton. La vivo ja havas tiom da flankoj, de kiuj oni povas observi ĝin.

Sed ni spertus ke pli malpli frue, ĉiu el ni rigardos la vivon laŭ ĉiuj tiuj manieroj. La vivo havas diferencajn kolorojn. Kaj same kiel la koloroj estas rekondukeblaj al la lumo, same tiel tiuj diversaj diroj pri la vivo rekondukas al tiu unu opinio kiun havas la suno pri ĝi:

„La vivo estas destino disdoni lumon kaj varmon.“

„Disvastigi lumon kaj varmon“, ĉu ĉi tio ne montriĝas ĉe ĉio, kio estas kreita? Ĉu la beleag koloroj de la floroj, la papilioj kaj kelkaj birdoj ne estas ravo kaj dorloto por la okuloj? Ĉu vi jam observis la majestatan larĝe disetenditan plumvoston de la pavo, kiam ĝi igis sin bela por plaĉi al la pavino? Kaj kiam ĉi tiuj diferencaj koloroj sur la plumoj tiel belege briletas en la sunlumo? Kiel emociige kaj delikate estas rigardi la roserojn sur la ĵus ekflorinta rozo, kiam en la komenco de la mateno la unuaj sunradioj kvazaŭ sorĉe transformas tiujn roserojn en brilegajn en briletajn diamantojn? Ĉu vi iufoje observis la flugetadon de la papilio tiel riĉa je desegnoj kaj koloroj? Tio ravas nin same kiel la mirige bele blua koloro de la libeloj, kiuj ŝvebas kun siaj sveltaj korpecoj super la arbarlaĝetoj dum oni vidas tremeti la aeron ĉirkaŭ ili, kiam ili nekonsciaj pri sia beleco eksidas sur la foliaro de la kano.

Lumon ili disĵetas! La floroj kaj la birdoj kaj la papilioj kaj ĝis blindige ni fikse rigardas tiujn miraklojn de la naturo kaj fariĝas varme ĉirkaŭ nia koro kaj entuziasme ni kriis: „Ili vivas por plenumi taskon!“ Kaj ili faras tion kun granda amo! Kun tiu amo, kiun ili, ricevis de sia Kreinto; kaj tre humile ili plenumas sian devon: disdoni lumon kaj varmon.

La talpo nomas la vivon: batalo en la mallumo. Koncerne lin, tio estas vera. Tamen kontente ĝi faras tiun taskon, ĉar ĝi estas lokita en la mallumo kaj tie ĝi plenumas sian devon ekstermante la troon da insektoj. Ĉu ankaŭ la ministro ne rampas en la teron por suprenirigi la por ni tiel necesan karbon, la energiigilon por fari lumon kaj varmon? Nek la talpo nek la ministro plendetas pro la penado kaj laborego; same ne kiel la formiko kiu trenas ŝarĝon pli pezan ol ĝi mem. La pajlospiko estas necesa por la formiknesto kaj kiel veraj idealistoj ili laboras por la komuna utilo. Kaj same kiel la talpo, la formiko kaj la ministro ankaŭ ni devas utiligi niajn kap-kaj manlaborojn por la feliĉo de la tuta homaro; por doni reciproke tiujn lumon kaj varmon, kiujn ĉiu el ni tiel ŝatas kaj tiel bezonas.

Kaj... ĉu vi iam pensis pri la pluvetoj?

Kiel milde kaj abunde ili falas sur la plugitan kampon en kies sulkojn la terkulturisto disĵetis la semon, kiu trankvile atendas tie ĝis la nutriga pluvakvo germigas ĝin kaj kiu poste produktos abundan rikolton.

Kiel lumdonanta estas la flava koloro de la ondanta greno! Per la greneroj, maturigintaj pro la sunvarmo, estas bakata nia ĉiutaga pano, kiu estas nutraĵo por nia korpo kiel konstrumaterialo por nia ĉelaro; kaj per tio nia sango fluas varme en la vejnoj; kaj niaj okuloj elradias lumojn pro la ekstazo de emociplena feliĉo kaj kortuŝa gojo pro tiom da lumo kaj varmo donita kaj ĝuita de ĉio kreita.

La scienculo nomas la vivon lernejo. Jes, lernejo por plibonigi sin mem, ĉiam plue por perfektigi la proprajn naturon kaj karakteron, por ekstermi er-

arojn kaj malbonaĵojn, por ĉiutage ankoraŭ ĉizi kaj labori la bonajn kvalitojn. Ne por peti lumon kaj varmon, sed por ĉiam denove propramove kaj spontanee disdoni ilin kaj per tio vi simlu la sunon, kiu volas inin instrui, ke la vivo estas destino por disdoni lumon kaj varmon.

Ida Rees van den Ende

**Bibliografio**

ESPERANTO. Junul-kurso ilustrita. Eldonis S.A.T.-Amikaro, Paris, 80 p., 17 x 25. Prezo:

Dudek lecionoj pri la ĉiutago laŭ la rekta metodo kutimigu la junajn lernantojn al la ĉefaj elementoj de la gramatiko kaj derivado. Simplaj sugestaj desegnoj igas la tekston tuj komprenebla, evitigas fojo-post-fojan tradukon, kiu facile ŝanĝas Esperanto-lecionon en nacilingvan babiladon.

Por ke ĉiuj kursanoj, ne nur la plej lertaj, kiel eble plej ofte kaj de la komenco parole uzu la lingvon, la aŭtoro abunde provizas per demandoj, kiujn unu grupo kolektive legu, al kiuj alia kolektive respondu. La aŭtoro konscias, ke la proponitaj tekstoj ne sufiĉas por havigi eĉ nur elementan mastrecon pri la lingvo kaj tial senĉese instigas en siaj „konsiloj al la kursgvidantoj“ aldoni ekzemplojn pri difinitaj frazkonstruoj. Kio antaŭsupozas ĉe la gvidanto sufiĉan konon por kompletigi la bazan tekston, tute fidindan certe, sed kelkfoje iom rapidantan. (Ekz.: -us kaj -u en unu leciono; same *igi* kaj *iji*).

Ce la fino de ĉiu leciono la aŭtoro tre koncize resumas nacilingve (t.e. france) la gramatikajn akiritajojn kaj aldonas por kontrolo tradukekzercon, hejme skribotan.

Sed li ne nur instruas lingvon, li ankaŭ volas daŭre ligi la kursanojn al Esperanto per ĝia utiligo. Felietone rakontante la vojaĝon de du geknaboj tra la mondo, li vekas scivolon kaj intereson pri fremdaj landoj, entuziasmigas pri korespondado kun alilandanoj, renkontigoj, vojaĝoj eksterlanden.

Laŭdinda celo certe, sed ĝi preskaŭ neeviteble enkondukas kelkajn maloftajn vortojn, kiuj envere karakterizas la fremdan landon, frapas la imagon, sed ŝarĝe pezas en elementa kurso. „Taŭro-ludo, sarkofago, hieroglifo, koalio, lino, k.a., kiel ankaŭ „heliko, testudo, struto, haltero,“ estas tro specialaj por ke oni tuj envicigu ilin en la aktivan vortprovizon.

La teknika prezentado estas plej plaĉa. Ŝajnas tamen preferinde uzi apartan litertipon por ĉiu nova vorto, kiu nun nerimarkite perdiĝas en la unuformeco de la teksto.

Sume: Bonega ilo, se en la manoj de lerta instruanto.

F. C.

POST LA KURSO. Perfektiga libro de Esperanto. Wilhelm und Hans Wingen. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn. 1953.

Broŝ.: 100 pag., 15 x 21; ilustrita. Prezo:

Tre valora helpilo estos ĉi tiu lernolibro al la germanlingva gvidanto de porprogresantaj klubvesperoj, kiu devas transalti la krizan momenton post la elementa kurso.

Fojon post fojo la libro provizas anekdotojn kiuj paroligos la lernantojn, zorge elektas sufiĉan kvanton da plej utilaj vortradikoj kaj kunmetaĵoj, funde ekspluatas la eblojn de la derivado per afiksoj, daŭre atentigas pri germanaj parolturnoj, proponas ne malmultajn ekzercojn.

La abunda kaj fidinda instrumaterialo estas prezentita en 15 duoblaj lecionoj. Ĉiun apartan lecionon la aŭtoro tiamaniere kunmetis, ke pro ĝia ofta variigo ĝi evitos la monotonecon per kiu minacas la tro sistema pritraktado de po unu difinita punkto en unu kunveno. Teoriajn konsiderojn ili reduktas ĝis strikta minimumo, dum laŭalfabeta tabelo resendas al la dissemittaj artikoloj.

Sendube la emo al koncizeco kulpas, ke en la prezentado de la paragrafoj pri la derivaĵoj mankas sufiĉa klareco: Esperanto kaj germanaj tradukoj ja konfuze intermiksigas, kvazaŭ la ĉefo celo estus: gajni spacon.

Entute: tre laŭdinda verko.

Fr. C.



**Ŝipekskurso**

Al F.ino v. d. B.

Trankvile ŝipet' ĝlitas  
Sur Amstel la river';  
Dum suno eksubiras  
Freŝiĝas la aer'.

Sur benko mi sidiĝas  
Plaŭdadas ondetar';  
Subite min rigardas  
Helblua okulopar'.

Kaj kun ridet' ĉiela  
Ŝi alparolas min;  
Pri ĉio ajn babilas  
Ni ĝis ekskursi fin'.

Kiam vespera vento  
Ektremigas ŝin  
Mi elradias varmon!  
Per rid' ŝi dankas min.

Ripozas en brak' mia  
La mola ŝultropar';  
Suspekte nin rigardas  
Ano de la Estrar'!

Per siaj oraj haroj  
Vangon tikladas ŝi;  
Sovaĝe fluas sango...  
Ho!, plijuniĝus mi!

En urbo reveninte  
Ĝis tram' ŝi gvidas min;  
Per mankiŝet' kaj rido  
Mi adaŭas ŝin.

En rev' mi ŝin revidas  
Okulon en okul'  
.....  
Vekiĝu do!, stultulo!  
Maljuna frenezul'.

Andreo Ludovikido.



**Anoncetoj**

Deziras korespondi kun studentoj s-ro Mitsuki Katajama, Tsukida, Kasakawa-mura, Setagun, Gumma-ken. Japanujo, 19-jara studento pri biologio.

Komt, en 'n beidt niet meer

Nun, ne atendu plu  
rond' junulara;  
hop igu koron kaj  
langon saltfara;  
for estas vintro kaj  
verdas herbej';  
voĉon malligu kaj  
langon: jen maj'!

trad. H. Vermuyten

(daŭrigo de paĝo 3)

mian pretendon. Kial mi spertas Esperante se mi vivas en anglalingva medio? Ĉu mi scias certe? Tamen, miaj plej karaj amikoj estas ĉiuj tiaj homoj, kiuj spertas plej profunde en Esperanto, kaj kun ili mi ĉiam rilatas, ĉu parole ĉu letere, per nia preferata lingvo. Ĉio plej kara al mi intime ligiĝas kun la internacia lingvo, kaj la angla lingvo fariĝis por mi la „fremda“ lingvo, kaj la anglalingva medio estas medio en kiu mi vivas nur devige, ne volonte. Se mi povus vivi nur en internacia medio! Jen estas do miaj motivoj por tio, ke mi verkas poezion en Esperanto anstataŭ en mia nacia lingvo.

WILLIAM AULD.

**Naskiĝo**

La 21-an de Julio '53 naskiĝis Reinold filo de S-ro R.Höster, sekretario, kaj Sino E.Höster-Zondervan, kasistino de nia sekcio en Enschede.

Kore gratulante la gepatrojn ni esperas ke ĉi tiu denaska esperantisto prospere grandiĝu por helpi siajn gepatrojn en ilia laboro por nia lingvo.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Postbus 100 — Mechelen en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. - Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned).